

Okdek jaroj de esperanta vivo, 7-a parto

La Esperantisto

Claude Gacond, 185-a radioprelego, 1967.04.26 & 1967.04.29

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtundan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Johano Dietterle, la kompilinto de la *Originala Verkaro* de Zamenhof, menciis en rimarko, ke en 1929 nur du kompletaj kolektoj de la unua esperanta gazeto ankoraŭ ekzistis. Ilin tiam posedis Edgard von Wahl en Reval kaj Eugen Wüster en Berlin.

A.- Jam en la kvina jaro de la esperanta erao Zamenhof, tiam redaktoro de *La Esperantisto*, ne plu posedis kompletan kolekton de tiu gazeto.

Cl.- Ni ne konas la hodiaŭan situacion. Eble kolektantoj kapablis formi novajn kompletajn kolektojn. Almenaŭ dank'al la kompilado de Johano Dietterle ni posedas la ĉefajn artikolojn verkitajn de Zamenhof por *La Esperantisto*.

A.- Ofte la studo pri la pioniraj movadoj estas malfaciligata pro malapero de fundamentaj dokumentoj. Pioniroj estas agemuloj, kiuj ĝenerale ne perdas sian tempon por ordigi arkivaĵojn. Kaj kiam hazarde ili tion faras, la fato sin ŝarĝas detrui ilian laboron.

Cl.- Ni menciu tiurilate, kio okazis al la irlandano Richard Geoghegan. Tiu pioniro de esperanto, fakulo pri la ĉina kaj japana lingvoj, korespondis jam en novembro 1887 kun Zamenhof. Tio signifas, ke plej verŝajne li estis la unua esperantisto inter la angle parolantaj popoloj.

A.- Li tuj konsciis pri la historia graveco de esperanto kaj letere rilatis kun Antoni Grabowski, la fama poligloto, kun Edgar von Wahl, la aŭtoro de la unua esperanto-hispana vortaro, kun Leopold Einstein, la eksvolapukisto, kaj kun centoj da aliaj gesamideanoj, kies nomojn ni ne ankoraŭ menciis.

Cl.- Tiun korespondadon li atentege konservis kaj li kolektis ĉiujn eblaj dokumentojn en aŭ pri esperanto.

A.- La hejmo de Richard Geoghegan fariĝis la arkivejo de la esperantismo. Nek revolucio, nek la stulteco de heredantaro dispelis tiun dokumentaron. Sed pri ĝi okupiĝis incendio. En 1904 kelkaj horoj dum brulego neniigis la laboron de tuta pionira vivo.

Cl.- Se multaj leteroj kaj interesaj dokumentoj perdiĝis, tamen restas sufiĉe da dokumentoj en diversaj arkivejoj por nia informado. La gazeto *La Esperantisto* estas dokumento, kiu alportas apartajn utilajn sciigojn pri la periodo 1889-1895-a, en la esperanta erao pri la jaroj 3-a ĝis 9-a.

A.- Christian Schmidt, la prezidanto de la Mondlingva Klubo en Nürnberg, okupiĝis pri la redaktado de tiu gazeto dum nur 4 monatoj. 113 abonantoj ne povis kovri la pres-elspezojn.

Cl.- Sed Zamenhof ne povis sin rezigni pri la malapero de la sola ligilo inter la esperantistoj. Li ĉerpis plian fojon el siaj lastaj financaj rezervoj por vivtenigi la gazeton.

A.- Pro tio ekde 1890 *La Esperantisto* transiras en liajn manojn. Kia fonto al zorgoj por Zamenhof.

Cl.- En siaj artikoloj la malriĉa pola okulisto proklamas la urĝan neceson fondi Tutmondan Ligon de Esperantistoj. Li eĉ prezentas projekton de statuto.

A.- Ni ne povas imagi, kiom revolucia tiam estis la zamenhofa propono. Nia generacio tre bone komprenas, ke ideo ekludas socian rolon, nur kiam ĝi enkorpiĝas en influpevan organizaĵon.

Okdek jaroj de esperanta vivo, 7-a parto

La Esperantisto

Claude Gacond, 185-a radioprelego, 1967.04.26 & 1967.04.29

Cl.- Sed por la homoj de la fino de la deknaŭa jarcento, homoj ĝenerale burĝe liberalaj, ĉia propono pri limigo de la individua libereco profite al organizaĵo ŝajnis herezaĵo, kontraŭ kiu opozicio endis.

A.- Leopold Einstein, Antoni Grabowski, Edgar von Wahl, Richard Geoghegan, homoj kiuj senpacienciĝis pro la malrapido de la disvastiĝo de esperanto kaj serĉis la kaŭzojn de tiu lanta progreso, ne povis kompreni Zamenhofon. Kun centoj da aliaj esperantistoj ili protestis kontraŭ la propono pri Ligo. Jen citaĵo pri iliaj argumentoj :

Cl.- « *La paca natura vojo, laŭ kiu nia afero iris ĝis hodiaŭ, estas la plej bona, kaj oni ne devas riski novaĵon, se la malnovaĵo estas bona.* » (Fino de la citaĵo.)

A.- Do por ili estis bone, ke sola homo garantiu per sia nokta laboro kaj propra kapitalo la aperadon de la sola gazeto. Estis nature, ke ne ekzistu demokrate elektita lingva aŭtoritato. Sed kiam Zamenhof, pro neekzisto de tiu akademio, mem devos decidi ion, tiam tiuj homoj plendos, ke li uzurpas nericevitan rajton.

Cl.- Aliaj havis en Zamenhof religian fidon. Por ili li estis la sola, kiu sciis kiel uzi la lingvon. Tiuj homoj disvolvis kulton al la Majstro, kiu estis tre peniga afero por Zamenhof mem. Sed tiu adorado ne iris ĝis la efektivigo de la deziroj de la Majstro. Al lia propono pri fondo de Ligo la adorantoj argumentis :

A.- « *La sola rezultato de la Ligo estos, ke ĝi ligos al ni mem la manojn.* » (Fino de la citaĵo.)

Cl.- Dum tuta generacio tia argumentado malhelpis la kreadon de komuna internacia esperantista organizaĵo. Nur kiam nova generacio aperos, la revo de Zamenhof pri Ligo realiĝos. En 1908 okazis tiu evento. Esperanto enkorpiĝis en la **Universalan Esperanto-Asocion**. Tiam la lingvo estis 21-jara.

A.- Théophile Rousseau, franca matematikisto, Hector Hodler, ĝeneva gimnaziano kaj Alphonse Carles, estas la tipaj reprezentantoj de tiu dua generacio, kiu deziris enkonduki esperanton en la ĉiutagan vivon. Ilia proparolanto estas Edmond Privat.

Cl.- Por Zamenhof, tiom longe kiam ne ekzistos esperantista Ligo, esperanto similos al animo sen korpo. Kiu garantios la financojn de la movado? Kaj se la disputoj pri reformo de la lingvo kreskos, kia aŭtoritato decidus ?

A.- Por Zamenhof la ritmo de la disvastiĝo de la lingvo dependos de la sinteno de la esperantistoj. La lingvo posedas ĉiujn kvalitojn necesajn al internacia lingvo.

Cl.- La adeptoj de Zamenhof tion komprenis post longaj jaroj plenaj je lingvaj kvereloj. Kiam oni trafolumas la gazeton *La Esperantisto*, oni trovas ĉefe artikolojn prilingvajn. Tiurilate la unua organo de la esperantistoj multe similas al la organoj, kiujn sin donos post 1907 la idistoj, post 1922 la okcidentalistoj kaj post 1951 la adeptoj de Interlingua.

A.- Kiam la esperantistoj ĉesis disputi pri la taŭgeco aŭ maltaŭgeco de radikoj aŭ afiksoj kaj ekuzis sian lingvon kiel vivantan lingvon por utilaj taskoj, la lingvo rapide disvastiĝis en la tutan mondon kaj en la plej diversajn sciencojn.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-